



Boletín

n° 430 Aprilo - Junio 2020



Asociación de utilidad pública

Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio
aperanta de 1949
Numero 430

Redakto-skipo
Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.

Revizio: Alejandro Pareja / J. A. del Barrio

Retadreso de la bulteno:
bulteno@esperanto.es

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la
respektivaj aŭtoroj

* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

*Republikado de enhavo nur permesita kun per-
meso de la redakcio aŭ de la aŭtoro

Financaj aferoj: financoj@esperanto.es

Aliaj aferoj (escepte de financaj):

admin@esperanto.es

Hispana Esperanto-Federacio *Federación Española de Esperanto*

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7

ES-28015 Madrid

admin@esperanto.es

Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31
0204011961

TRIODOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926
4025

Poŝtelefono: +34 638 547 104

Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon
en la aŭtomata respondilo)

Estraro

Prezidanto: José Antonio del Barrio

Vicprezidanto: Ángel Arquillos López

Sekretario: Águeda Biurrun

Kasisto. Jesús M. García Iturrioz

Voĉdonantoj: Eduardo Berdor
“ Alberto Granados

Prezidanto HEJS: William Guerrero

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)
DL: M-39811-2012 / ISSN 2444-8400

SALUTVORTOJ

Ni publikigas tiun ĉi novan numeron de nia “Boletín” en iom pli bonaj cirkonstancoj ol la pasintan, sed ankoraŭ sub la influo de la pandemio de la kronviruso Covid-19. Ni scias ke ĝi bedaŭrinde trafis plurajn membrojn de la esperantista komunumo, kaj ni akompanas vin spirite en la suferoj okazigitaj, se tiu estis via kazo.

La pandemio plu influas en la esperantista vivo, kun la prokrasto de multaj esperantistaj renkontoj, kiel vi povos legi en aparta mesaĝo. Ankaŭ la Hispanan Kongreson ni devis bedaŭrinde prokrasti. Unue ni esperis okazigi ĝin en oktobro, sed ni trovis ke la sansituacio ankoraŭ ne estas sufiĉe fidinda ke ni povas riski problemojn, kaj fine la Loka Organiza Komitato, interkonsente kun la estraro de HEF, decidis prokrasti la kongreson al majo de 2021. Ni tre bedaŭras la decidon, sed esperas ke vi komprenos la cirkonstancojn.

Ankaŭ nian Ĝenerala Kunvenon ni devis okazigi en tre specialaj cirkonstancoj, utiligante la retajn komunikilojn. La ĉeesto estis tamen sufiĉe akceptinda, kaj do ni provos estonte pli amplekse profiti tiujn retajn rimedojn. Ĉiukaze, kiel vi legos en la protokolo, ni decidis kunvoki novan Eksterordinaran Kunvenon por la monato oktobro, dum kiu, se necese, oni denove analizos la decidojn prenitajn.

Ni ankaŭ prokrastis la decidon pri renovigo de la Estraro, kiu nepre ŝanĝiĝos en tiu Eksterordinara Kunveno. Pripensu vian kontribuon al la disvolvigo de la asocio, kaj specife vian propran kandidatigon al la estraro. Ni kalkulas je ĉies kunlaboro por la firmigo de la Federacio. Ne estu timema, kandidatu; vi ĝuos ĝin!

Dume, ĝuu la esperantan vivon, eĉ se en specialaj cirkonstancoj, kaj havu tre feliĉan someron!

*José Antonio del Barrio
Prezidanto de HEF*

ENHAVO

Salutvortoj	1
Noto pri Boletín429	2
Protokolo ordinara ĝenerala kunveno 24/5/2020	3
Asambleo Generala Extraordinaria	6
Dankon pro donaco	7
Forlasis nin	8
Fundación Esperanto, Financa Informado	9
Sano kaj Esperanto	11
Programo de la Monda Festivalo	12
53-a Virtuala Konferenco de ILEI	14
Pliaj rimedoj por praktiki Esperanton en la reto	15
Virtuala celebrado de la Tago de la Libro	15
Pri Grupoj kaj Asocioj	16
Hispana Amikaro de Fervojistaj Esperantistoj	17
La specifa larĝeco de la hispana larĝ-trako	17
Dokumentoj alvenintaj al la Biblioteko en 2019	20
La nekredbla historio de la pastro Félix	23
Semo de matenuĝoj	27

NOTO PRI BOLETÍN 429

La anoj ricevantaj la “Boletín” en papero notos ke ni sendas kune la numerojn 429 kaj 430. Kiel ni eksplikis en la pasinta numero, ni devis prokrasti la paperan sendon, por eviti problemojn al la poŝta servo. Ni bedaŭras tion, sed esperas ke vi komprenos.

Esperable vi ricevis ĝin rete, per pdf-versio. Ni sendis ĝin al ĉiuj anoj kies retadresojn ni konas. Se vi ĝin ne ricevis, bv. kontakti kun la sekretario, ĉe admin@esperanto.es, por informi pri via adreso, kaze ke ni ne disponas je tiu informo, aŭ ĝi ne estas ĝisdata. Ni esperas pli kaj pli utiligi la retajn rimedojn por komunikado inter la anoj kaj la estraro, sekve al la spertoj dum la deviga enhejmiĝo. Bv. informi la sekretarion se vi preferas ke ni sendu tiel al vi la informojn pri kunvokoj, kotizoj, ktp, kaj speciale se vi preferas ke ni sendu al vi la bultenon virtuale, tiel ŝparante kostojn pri papersendo. Komprenoble ni plu eldonos la bultenon papere, kaj vi povas ĝin tiel ricevi, se por vi tio estas pli konvena aŭ komforta, esperante ke la pasinta sperto estis nur escepta.

Bonan legadon en ĉiuj manieroj!

PROKOKOLO ORDINARA ĜENERALA

KUNVENO 24-5-2020

La 24-an de majo de 2020, je la 10,00 horoj, laŭ kunvoko de la Prezidanto, okazis Ordinara Ĝenerala Kunveno de Hispana Esperanto-Federacio pere de virtuala konferenco, laŭ la jena tagordo:

- 1.- Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa ordinara kunveno (5a majo 2019)
- 2.- Aprobo de la kontoj kaj kas-stato de 2019.
- 3.- Aprobo de la raporto pri aktivaĵoj de 2019
- 4.- Informo pri la anaro.
- 5.- Aprobo de la Buĝeto por 2020.
- 6.- Kotizoj por la jaro 2021.
- 7.- Renovigo de la Estraro.
- 8.- Projektoj por 2020-2021.
- 9.- Sugestoj kaj demandoj.

Ĉeestantoj:

Ĉeestas la kunvenon la Estraro kaj 16 anoj. En tute, 22 ĉeestantoj, 5 el ili reprezentitaj de aliaj anoj kaj ankaŭ estas reprezentataj la Grupoj: Bilbao, Andaluzio, Madrido (Liceo), Teruelo (Liberanimo) kaj Zaragozo (Frateco).

1- Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa ordinara kunveno.

Ĝi estis publikigita en Boletín numero 426. Oni aprobas unuanime.

2- Aprobo de la kontoj kaj kas-stato de 2019.

La propono de kontoj kaj kas-stato de la jaro 2019 estis publikigita en Boletín numero 429. Post mallonga eksplikado kaj diskuto, oni aprobas unuanime.

3- Aprobo de la raporto pri aktivaĵoj de 2019.

La raporto pri aktivaĵoj de la jaro 2019 estis publikigita en Boletín numero 429. Post mallonga eksplikado kaj diskuto, oni aprobas unuanime.

4- Informo pri la anaro.

La resuma informo pri anaro de la jaro 2019 estis publikigita en Boletín numero 429. La prezidanto informis pri la aktualigo en la datumbazo de anoj, okazinta komence de la jaro 2020 kaj ne inkludita en tiu informo, pro la forigo el la asocio de la anoj ne pagintaj dum la du lastaj jaroj, kaj kun kiuj oni provis kontakti por solvi tiun nepagadon sen ricevi respondon.

La prezidanto informas ankaŭ pri la malapero de la grupoj en Katalunio, kolektivaj membroj de la Federacio, pro manko de anoj pretaj daŭrigi la aktivadon.

Oni parolas pri la malfacilaĵoj de la Federacio por altiri la junulojn.

5- Aprobo de la buĝeto por 2020.

La propono de buĝeto por la jaro 2020 estis publikigita antaŭ tiu ĉi Kunveno en Boletín numero 429. La Estraro informas pri la necerteco de pluraj eroj de la buĝeto, kiuj eble ne povos realiĝi pro la pandemio de Covid 19.

Oni informas pri la pagoj de la kurso de la Uned al la instruistoj kaj pri la subvencioj de HEF por du lernantoj.

La prezidanto informas pri la ricevo de mono ĉe la Federacio, pro decido de la organizantoj de la Internacia Semajno de Kulturo kaj Turismo de Katalunio kaj pro la fermo de la Kultura Asocio Esperantista.

La buĝeto restas tute malsama al tiu publikigita pro la situacio de pandemio.

Oni sugestas anstataŭi en la buĝeto la monon de la IJK, kiu devis esti nuligita, por subvencii aliajn junularajn rekontiĝojn de la junulara sekcio.

Oni aprobas la buĝeton kun tiuj rimarkoj kaj tiu ĉi sugesto unuanime.

6- Kotizoj por la jaro 2021.

La estraro proponas lasi la samajn kotizojn por la jaro 2021.

Oni aprobas unuanime.

7- Renovigo de la Estraro.

Kiel estis anoncite, en tiu ĉi jaro oni devas renovigi la Estraron de la Federacio, pro fino de la deĵorperiodo. La prezidanto rememorigis ke kelkaj el la nunaj anoj ne deziras daŭrigi en sia posteno, kaj informis pri la kandidateco de Manuel Parra Benito al la posteno de Sekretario. Tamen, restas nesolvita la renovigo de la posteno de prezidanto, por kiu alvenis neniu kandidateco.

La prezidanto proponas prokrasti la renovigon de la Estraro ĝis oktobro, kadre de la Hispana Kongreso kiu estas antaŭvidita en Comillas. Se tiu ĉi ne povos esti organizita, oni kunvokos eksterordinaran Kunvenon, en la sidejo aŭ virtuale.

Oni proponas ankaŭ ke Manuel Parra estu invitita al la kunvenoj de la nuna Estraro, ĝis kiam oni celebros novan Ĝenerala Kunvenon.

8- Projektoj por 2020-2021.

Oni akordas lasi tiujn projektojn por la venonta Estraro.

Momente, la prezidanto sugestas, kiel tujajn taskojn:

-Kreado kaj instruado de la kurso je nivelo B1, en la UNED.

-Disvastigo de la 100a datreveno de la gastigo de aŭstriaĵ infanoj rifuĝintaj el la Unua Mondmilito ĉe hispanaj esperantistoj.

-Organizado de la Hispana Kongreso en Komillas, en oktobro, kaj serĉo de nova sidejo por la kongreso de 2021.

9- Sugestoj kaj demandoj.

Alberto Granados informas pri la ekspozicioj per la paneloj de HEF en Sagunto kaj la planoj organizi la ekspozicion en Albarracín, kiu devis esti nuligita pro la pandemio. La Estraro memorigas ke la paneloj estas je la dispono de grupoj kaj aktivuloj kiam la cirkonstancoj ebligas la organizadon de novaj ekspozicioj.

Carlos Pesquera informas pri la rekontiĝoj de junuloj. La IJK 2021 ankaŭ estis nuligita pro la sekvoj de la pandemio Covid 19. Do, li havas projekton por organizi junularan renkontiĝon, eble en Kanarioj aŭ alia loko de Hispanio, kaj oni parolas pri la eblo organizi la IJK samtempe kun Hispana Kongreso. Li ankaŭ komentis la planojn organizi novan Benkontiĝon en decembro 2020.

La Kunveno finiĝas je la 12,00 horo.

La Prezidanto

La Sekretario

José Antonio del Barrio

Águeda Biurrún

NOTO PRI LA KONGRESO

Post la okazigo de la Ĝenerala Kunveno, la Loka Organiza Komitato de la Hispana Kongreso de Esperanto de Comillas (Kantabrio) decidis, interkonsente kun la estraro de HEF, denove prokrasti la Kongreson al la venonta jaro. La decido estis malfacila, kaj, eĉ se la sanitara situacio notinde pliboniĝis, precipe en Kantabrio, ni konsideris pli prudente ke la ĉeesta renkonto estu okazigita en majo 2021, unu jaron post tio antaŭvidita. Ni informos pli poste pri la detaloj de la evento. La personoj jam aliĝintaj povas kontakti la organizan teamon, por konservi sian rezervon aŭ por peti la repagon de la kotizoj.

ASAMBLEA GENERAL EXTRAORDINARIA

El Presidente de la Federación Española de Esperanto invita a los miembros de la asociación a participar en la Asamblea General Extraordinaria, que tendrá lugar el domingo 18 de octubre de 2020, a las 9:30 horas (a las 10:00 en segunda convocatoria) en la sede social, calle Rodríguez San Pedro, 13, 3º, de Madrid, con el siguiente orden del día:

- 1.- Lectura y aprobación del acta de la anterior asamblea ordinaria (24 de mayo de 2020).
- 2.- Información y aclaraciones sobre las decisiones tomadas en la Asamblea Ordinaria, sobre cuentas, memoria de actividades y presupuestos.
- 3.- Renovación de la Junta Directiva.
- 4.- Proyectos para 2020-2021.
- 5.- Ruegos y preguntas.

IMPORTANTE: Los miembros de la Federación que deseen ser representados por algún otro socio, deben enviar un mensaje indicando claramente el nombre completo del representante y representado, al buzón electrónico, admin@esperanto.es o bien por correo postal a las oficinas de la asociación, antes del 15 de octubre.

La asociación establecerá medios telemáticos para que los asociados puedan participar desde su domicilio, por medio de la cuenta de Skype de la Federación @esperanto.es, u otras que podrán ser consultadas con la Directiva.

El Presidente de la Federación
José Antonio del Barrio Unquera

EKSTERORDINARA ĜENERALA KUNVENO

La Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio alvokas la anojn de la asocio partopreni Eksterordinaran Ĝeneralan Kunvenon, kiu okazos la 18-an de oktobro de 2020 (dimanĉe), je la 9:30 horo (je la 10:00 horo en dua alvoko), en la oficiala sidejo, strato Rodríguez San Pedro, 13, 3º, de Madrido, laŭ la jena tagordo:

- 1.- Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa ordinara kunveno (24a majo 2020).
- 2.- Informoj kaj klarigoj pri la decidoj prenitaj en la Ordinara Kunveno, rilate al kontoj, raporto pri aktivaĵoj kaj buĝeto.
- 3.- Renovigo de la Estraro.
- 4.- Projektoj por 2020-2021.
- 5.- Sugestoj kaj demandoj.

GRAVAJ RIMARKOJ: La membroj de HEF, kiuj deziras esti reprezentataj fare de alia membro, sendu mesaĝon informante pri tio, klare indikante la kompletan nomon kaj de la reprezentanto kaj de la reprezentato, al HEF-a retroŝta adreso admin@esperanto.es, aŭ per ordinara poŝto al la oficejo de la asocio, antaŭ la 15-a de oktobro.

La asocio organizos telematikajn rimedojn por ke la anoj povu partopreni je distanco, pere de la konto de Skajpo de la Federacio @esperanto.es, aŭ per aliaj kiujn oni povos interkonsenti kun la Estraro.

La Prezidanto de HEF
José Antonio del Barrio Unquera

DANKON PRO DONACOJ

En la lastaj semajnoj Hispana Esperanto-Federacio ricevis du gravajn donacojn kiujn ni deziras danki publike.

La Kultura Asocio de Esperanto, organizanto de la lasta Internacia Semajno de Kulturo kaj Turismo, antaŭ la verŝajna malapero de tiu evento, decidis donaci la pluson restintan de ĝia organizado al diversaj esperantaj asocioj. Inter ili, nia asocio ricevis mil eŭrojn. Dankon al Rosa kaj ceteraj organizantoj.

Nia tradicia kolektiva ano en Katalunio, Kultura Asocio Esperantista (KAE), decidis malfondiĝi pro manko de aktivulaj fortoj. La restanta funkcia estraro decidis ke la mono restinta de ilia aktivado estu destinita al HEF, kaj nia asocio jam ricevis la tuton, preskaŭ okmil eŭrojn. Ni dankas la demarŝojn de Joana Hernández kaj la agadon de José María Galofré kaj la tuta ĝisnuna skipo.

FORLASIS NIN



La pasintaj semajnoj estis teruraj por ni ĉiuj, pro la paso de la kronvira pandemio. Ankaŭ la Esperanto-movado estis trafita de la pandemio, ĉu rekte, ĉu nerekte, kaj ni suferis la perdon de pluraj tre valoraj kaj amataj samideanoj.

Ni devas unue informi pri la forpaso de nia kara amiko Eduardo Larrouy. En nia pasinta numero ni informis pri lia 107-a datreveno, kaj publikigis lian biografion. Kelkajn semajnojn poste li estis enhospitaligita en Bilbao, kaj, kvankam li komence rezistis sian malsanon, fine lia korpo ne povis elteni kaj pace forpasis la 27an de aprilo. Diversaj omaĝoj venis el la tuta esperanta komunumo, nekrologoj aperis en diversaj komunikiloj, inklude de la Cadena SER de Bilbao. En la jutuba kanalo de HEF eblas spekti filmeton en lia memoro, ĉe: https://www.youtube.com/watch?v=szOjDw_11M. Ni kondolencas lian filinon, ceteran familion kaj lian tutan amikaron tutmondan.

Dum tiuj ĉi semajnoj forpasis en Katalunio ankaŭ la aktivulino Anna Rosselló kaj Marisol Graells, vidvino de la konata anarĥiista kaj esperantista aktivulo Germinal Gracia (konata kiel Víctor García). La 1an de aprilo mortis la pedagogo kaj diplomato Ricardo Díez Hochleitner, honora prezidanto de la institucio nomata Klubo de Romo, filo de la esperantisto Félix Díez Mateo, historia prezidanto de la Esperanto-Klubo de Bilbao.

Ekster Hispanio, ni devas noti la preskaŭ samtempan forpason de la verkistoj geedzoj Júlia Sigmond kaj Filippo Franceschi (konata sub la plumnomo Sen Rodin). Ni bedaŭras ankaŭ la morton de la iama direktoro de la Centra Oficejo de UEA kaj redaktoro de “Esperanto”, Victor Sadler, kaj de la kimra esperantisto Hilary (Bill) Chapman. Fine, post longa malsano forpasis ankaŭ Erika Dobrzyński, la edzino de Roman, la pola ĵurnalistino kiun multaj el vi memoras pro liaj vizitoj al nia lando, lastfoje okaze de la traduko de lia verko “La Zamenhof-strato”. Ni memoras ilin ĉiujn, kaj aliajn malpli konatajn ankaŭ suferintajn pro la pandemio, kaj ni kondolencas iliajn familiojn.

"FUNDACIÓN ESPERANTO": FINANCA INFORMADO

En antaŭa numero de "Boletín" aperis ĝenerala informado pri "Fundación Esperanto", okaze de la cirkonstanco, ke tiu ĉi fondaĵo plenumis 50 jarojn da ekzistado.

Iu samideno skribis al ni indikante valorajn sugestojn. Li menciis, ekzemple, ke estus interese prezenti la ekonomiajn datenojn kaj la financon etaton. En aliaj jaroj, oni informis pri tio en la jaraj asembleoj de HEF. Foje, ni rekte informis al eventualaj interesatoj. Tio povas esti neinteresa (eble teda) por kelkaj sed vere, almenaŭ foje, konvenas aperiĝi kaj videbligi tian informadon.

Jen la ĉefaj tabeloj (bilanco kaj spezokonto) de la lasta jaro [en hispana lingvo kaj sek-vante la normojn pri kontotenado]:

"FUNDACIÓN ESPERANTO": BALANCE		
ACTIVO	2019	2018
A) ACTIVO NO CORRIENTE	64.616,62	70.482,77
III. Inmovilizado material	22.341,64	22.677,89
VI. Inversiones financieras a largo plazo	42.274,98	47.804,88
B) ACTIVO CORRIENTE	2.307,17	3.765,50
III. Deudores comerciales y otras cuentas a cobrar		698,73
VI. Periodificaciones a corto plazo	114,16	
VII. Efectivo y otros activos líquidos equivalentes	2.193,01	3.066,77
TOTAL ACTIVO	66.923,79	74.248,27
PATRIMONIO NETO Y PASIVO	2019	2018
A) PATRIMONIO NETO	66.923,79	74.155,72
A-1) Fondos propios	44.582,14	51.477,83
I. Dotación fundacional	34.368,91	34.368,91
1. Dotación fundacional	34.368,91	34.368,91
III. Excedentes de ejercicios anteriores	16.410,18	17.801,35
IV. Excedente del ejercicio	-6.196,95	-692,43
A-2) Subvenciones, donaciones y legados recibidos	22.341,65	22.677,89
C) PASIVO CORRIENTE	0,00	92,55
V. Acreedores comerciales y otras cuentas a pagar	0,00	92,55
2. Otros acreedores		92,55
TOTAL PATRIMONIO NETO Y PASIVO	66.923,79	74.248,27

**"FUNDACIÓN ESPERANTO":
CUENTA DE RESULTADOS**

	2019	2018
1. Ingresos de la actividad propia		
3. Gastos por ayudas y otros	-700,00	-400,00
a) Ayudas monetarias	-700,00	-400,00
b) Ayudas no monetarias		
c) Gastos por colaboraciones y del órgano de gobierno		
7. Otros ingresos de la actividad		
8. Gastos de personal		
9. Otros gastos de la actividad	-1.477,95	-1.033,04
10. Amortización del inmovilizado	-336,25	-336,25
11. Subvenciones, donaciones [...] traspasados al ejercicio	336,25	336,25
A.1) EXCEDENTE DE LA ACTIVIDAD	-2.177,95	-1.433,04
14. Ingresos financieros	1.510,90	2.266,35
15. Gastos financieros		
18. Deterioro y resultado [...] de instrumentos financieros	-5.529,90	-1.002,58
A.2) EXCEDENTE DE OPERACIONES FINANCIERAS	-4.019,00	1.263,77
A.3) EXCEDENTE ANTES DE IMPUESTOS	-6.196,95	-169,27
19. Impuestos sobre beneficios		-523,16
A.4) Variación de patrimonio neto [...] del ejercicio	-6.196,95	-692,43
RESULTADO DEL EJERCICIO	-6.196,95	-692,43

Kutime, "F. Esperanto" helpas al E-agado kaj disvastigo pere de monhelpoj (prefere al E-grupoj kaj pro aktivaĵoj jam faritaj). En la lastaj jaroj, ĉar ne alvenis oftaj enspezoj, oni decidis enmeti monon en investa produkto kiu generus sufiĉajn profitojn. Tial, ni akiris akciojn ne por spekulado ĉe la burso sed por disponi de mono (per dividendoj) por alfronti la ĝeneralajn kostojn kaj por ebligi monhelpojn. Komprenoble, la valoro de tiuj akcioj oscilas (Kaj tial, en la spezokonto aperas provizora malpliigo de la valoro de ties akcioj).

La samideano antaŭe menciata same komentis, ke indus aperigi la nomon de iu grava iama kontribuanto. Nome, César de Mosteyrín y Castillo, el Segovia, proksimume en 1990 donacis unu milionon da pesetoj. Certe aliaj homoj multe kontribuis siatempe (eĉ kelkaj preferis fari tion anonime kaj petante ke ties nomo ne estus publikigata). Nun, mi ne rezistas la tenton menci i la lastan gravan kontribuon ricevatan. Nome 1000 € estis donacitaj de KAE (Kultura Asocio de Esperanto). Ĉi tiu asocio kiu okupiĝis lastatempe pri la organizado de la Internacia Semajno de la Kulturo kaj Turismo, pro la ne daŭrigo de la Semajno, decidis donaci la restantan monon inter kelkaj Asocioj au projektoj pri Esperanto.

Krome, foje pli ol pagoj gravas agoj, kaj multaj helpis diversmaniere. Al ĉiuj ni diras DANKON!

LORENZO NOGUERO

(Prezidanto de F. Esperanto)

SANON... KAJ ESPERANTON!

Okaze de la kvaranteno pro la koronavirusa pandemio, mi kiel Prezidanto de "FRATECO" decidis skribi al ties membroj. Tiu intenco same estas adresata al ĉiuj samideanoj.

Mi deziras, ke vi estu (kaj fartu) kiel eble plej bone, ene de (aŭ super) la aktualaj cirkonstancoj (permesu al mi citi inspirigan ideon de John Locke: "La feliĉo estas sinteno de la menso kaj ne kondiĉo de la cirkonstancoj").

Dum tiuj tagoj (kaj noktoj) eble vi povas aliri al vortoj en Esperanto...

Kaj eble vortoj (fortoj) aliras al vi. Nome (akronime):

Forto

Rezisto

Amikeco

Teamo

Esper(ant)o

Celebro

Optimismo

Amike kaj "Fratece",

Lorenzo Noguero

(Prezidanto de "FRATECO")

FUNDACIÓN ESPERANTO:

Banka konto en "CaixaBank": ES15 2100 5553 3621 0040 6825

RETA AKTIVADO EN ESPERANTUJO

La pandemio de kronviruso kaŭzis la nuligon de multnombraj renkontiĝoj kaj aktivadoj en la tuta mondo. Ne nur la hispana kongreso estis prokrastita por venonta jaro, sed ankaŭ estis nuligita la Universala Kongreso en Montrealo, la Internacia Junulara Kongreso, la kongresoj de SAT, ILEI kaj aliaj fakaj kaj landaj organizaĵoj.

Multaj el tiuj eventoj estis translokigitaj al la reto, kaj oni ja povis konstati dum tiuj ĉi semajnoj la signifan kreskon de virtualaj renkontiĝoj, kunvenoj, prelegoj kaj aliaj aktivadoj.

UEA estis unu el la plej aktivaj. En aprilo ili anstataŭis la tradician Malferman Tagon per reta kunveno, kun prelegoj, konversadoj kaj eĉ koncerto kun la itala kantisto Kĵara. Anstataŭe de la Universala Kongreso oni anoncis Mondan Festivalon, kiu estos eĉ pli ambicia: ĝi daŭros preskaŭ la tutan someron, kaj ne nur ampleksos Virtualan Kongreson en la datoj de la UK, sed multnombrajn renkontojn. Vidu la anoncitan programon (en la momento de redaktado de tiu ĉi bulteno) tuj poste.

Krome, oni anoncis diversajn kursojn je pluraj niveloj, inklude unu por hispanlingvanoj, kiun organizis la Kolombia Esperanto-Ligo fine de junio por la tuta somero.

Hispana Esperanto-Federacio okazigis per reto sian Ordinaran Ĝeneralan Kunvenon, la 24-an de majo. La protokolon vi povas legi aparte. Estas antaŭvidita Eksterordinara Ĝenerala Kunveno la 18an de oktobro, eble kun aliaj koneksaj aktivadoj.

Por koni aliajn eventojn, vizitu la retejon EventaServo <https://eventaservo.org>, kiu estis nun aktualigita por kolekti tiuspecajn renkontojn virtualajn.

PROGRAMO DE LA MONDA FESTIVALO

La Monda Festivalo de Esperanto - MondaFest' 2020 - estas internacia tutmonda festivalo organizata de UEA, tutsezono, de 20/06/2020 (sabaton) ĝis 20/09/2020 (dimanĉon). La programo de la festivalo konstante ĝisdatiĝos en Eventa Servo, en <https://eventaservo.org/e/mondafest2020> kaj laŭ apartaj eventoj por memstaraj programeroj ene de la festivalo. Kadre de MondaFest' 2020 okazos la Virtuala Kongreso de Esperanto (VK), de 01-08/08/2020.

Jen la anoncita programo (konstante ĝisdatigata)

20/jun - MondaFest' 2020: Somera Inaŭguro

26/jun - MondaFest' 2020: Tago de Azio kaj Oceanio (provizore)

27/jun - MondaFest' 2020: 65-a AMO-seminario: "Landaj Asocioj - Leviĝantaj Agantoj"

29/jun-03/jul - NASK 2020 1-a parto

06/jul-10/jul - NASK 2020 2-a parto

11/jul-18/jul - 76-a Internacia Junulara Kongreso (IJK)

18/jul-26/jul - SES kaj SEP - Somera Esperanto-Studado kaj Somera Esperanto-Programado

25/jul-31/jul - Virtuala Esperanto-Konferenco de ILEI (VEKI) – vidu programon poste.

01/aŭg-08/aŭg - MondaFest' 2020: Virtuala Kongreso de Esperanto (VK)

09/aŭg - MondaFest' 2020: Internacia Tago de la Indiĝenaj Popoloj de la Mondo

15/aŭg - Paralela Universo (virtualaj aŭ surlokaj renkontiĝoj)

20/aŭg-20/sep - MondaFest' 2020: Tutmonda Arbo-plantado

12/sep - 8-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj (sendu kontribuojn ĝis la 15-a de aŭgusto!)

19/sep - MondaFest' 2020: Tago de Veteranoj (provizore)


20/sep - MondaFest' 2020: Printempa Inaŭguro

Rezervu la datojn!

MondaFest' 2020



Universala Esperanto-Asocio

 <https://uea.org/aktuale>

53-A VIRTUALA ESPERANTO-KONFERENCO ILEI

La 53-a Virtuala Esperanto-Konferenco ILEI (VEKI) anstataŭas la nuligitan Kongreson en Kebekurbo, sed okazos dum la samaj tagoj: de la 25-a ĝis la 31-a de julio 2020. Por ĉiuj instruistoj, kursgvidantoj kaj homoj kiuj interesiĝas pri edukado, kun retaj prelegoj kaj debatoj.

Programskizo de la konferenco je la 1-a de junio 2020:

1-a Tago Unua sesio. INAŬGURO

La enkonduka prelego estos farita de Prof. Dr Davide Astori "Interlingvistiko kaj Universitato: pripensoj el fakula vidpunkto".

1-a Tago Dua sesio. Azia Mateno

Faktoj kaj fantazioj, poemoj kaj esprimoj pri la temo mateno. La prezento estos farita de Aŭrora Bute kaj Mireille Grosjean.

2-a Tago Strukturoj kaj Komitato

La komitatanoj estas informitaj pri la kunveno.

3-a Tago. Lingvoj

Iom post iom alvenas proponoj por prezentado de lingvoj. Kontribuoj bonvenas ĉe ilei.sekretario@gmail.com

4-a Tago. Tago de Esperanto en universitatoj

8 prelegoj jam planitaj : Astori, Danylyuk, Dols, Gobbo, Kouny, Manzano Arrondo, Petrovic, So. Estas entute 10 prelegmomentoj en tiu tago, sed profesoroj povas proponi aliajn konferencojn.

5-a Tago. La Tago de la Ligo. Kun la Gastronomia Rondo.

Pri la Ligo okazos raportoj pro la vivo de la Ligo kaj estos okazo diskuti pri ĝi. En preparo estas podiaj diskutoj pri IPR kaj Juna Amiko ; pri la bazaj servoj al la membroj kaj novaj vojoj por EIT Esperanto Instruista Trejnado. Por la Gastronomia Rondo jam alvenis kelkaj filmetoj. Same anoncu vin ! Filmistoj pri gastronomio : ek al kuirado kaj filmado !

6-a Tago. La Tago de Pedagogio.

Ok prelegproponoj alvenis. Same anoncu vin !

Krome, 6 artistoj anoncis koncerton: Anjo Amika, Bronŝtejn, Miguel Fernández, JoMo, Kajto, Fransoazo. Estas entute 20 artaj momentoj, fine de ĉiu sesio.

PLIAJ RIMEDOJ POR PRAKTIKI ESPERANTON EN LA RETO

Dum la deviga enhejmiĝo pro la pandemio, multaj Esperanto-organizaĵoj anoncis la senpagan disponon de diversa materialo por la homoj dezirantaj ĝui la lingvon per libroj kaj aliaj materialoj.

Hispana Esperanto-Federacio kolektis en sia retejo ampleksan liston de rimedoj por lerni kaj praktiki Esperanton, inklude de nia Bitoteko, kie eblas aliri librojn, revuojn kaj alian materialon. Ni ankaŭ inkludis ĉiujn niajn ekzemplerojn de “Boletín” en la reto; normale la lastaj kvar estas alireblaj nur por la anoj, en la privata spaco de nia retejo, sed ĉifoje ni disponigis ilin por ĉiuj interesatoj.

Ankaŭ eldonejo Mondial metis je ĉies dispono parton de sia katalogo, inklude de kelkaj Belartaj Rikoltoj, kun la premioj de la Belartaj Konkursoj de UEA. Ankaŭ Eldonejo Libera proponas ampleksan aron da libroj. Eĉ sonlibrojn oni povas libere aliri, danke al la iniciato de Germana Esperanto-Biblioteko en Aalen, kunlabore kun Stano Marček. Bv. serĉi en la reto, aŭ legu nian Bitbultenon ĉe <https://www.esperanto.es/hef/index.php/servoj/bitbulteno> por trovi la koncernajn ligilojn.

VIRTUALA CELEBRADO DE LA TAGO DE LA LIBRO

En tiu ĉi jaro ne eblis partopreni la tradician legadon de la verko Don Quijote, sed tamen, laŭ iniciato de Hispana Esperanto-Federacio, eblis ĝui la Internacian Tagon de la Libro, en virtuala maniero. HEF rememorigis siajn anojn kaj amikojn la 23an de aprilo ke en nia retejo troviĝas la plena versio en Esperanto de la majstra verko “La inĝenia hidalgo Don Quijote de La Mancha”, libere alirebla en formato epub: <https://www.esperanto.es/hef/index.php/295-don-quijote-en-esperanto>, kaj kuraĝigis la legantojn kunhavigi sian sperton, filmante sin dum oni legas pecon de la verko.

Vi povas spekti la rezulton en la jutuba kanalo de HEF, kun dekduo da legadoj en kvar filmoj, en la adreso: <http://www.youtube.es/esesperanto>.




PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

Andaluzio

DUM LA KVARANTENO NI PRAKTIKU ESPERANTON

Kelkaj geesperantistoj el Sevilo kaj mi el Malago, de kiam komencis la kvaranteno kunsidas ĉiutage per interreto por praktiki kaj plibonigi niajn konojn pri Esperanto. Tio estas grava sperto, ĉar vere ni lernas profitante la longan tempon, kaj ni malkovras niajn erarojn en bona etoso. Oni diras ke Esperanto estas la plej facila lingvo en la mondo, tamen dum tiaj retkunsidoj, mi malkovris ke Esperanto estas facile legebla prononcebla kaj parolebla, sed por lerni ĝin profunde, la afero komplikiĝas. Tamen laŭ mia sperto, temas pri la plej facila kaj utila lingvo, ĉar ni rajtas uzi ĝin laŭbezone kaj eĉ kaprice, ĉar la reguloj estas internaciaj por ĉiuj, sed danke al akuzativo ni povas uzi ĝin sentime fari erarojn, ĉar la gramatiko estas fleksebla kaj kreado de novaj vortoj estas facila. Mi jam verkis kvar poemarojn danke al facileco de la rimo kaj la beleco de multaj vortoj, kiuj vigligas min verki kaj malkovri fantaziajn rakontojn, per kiuj mi facile skribas versojn kaj komponas poemojn. Danke al ĉi-tiu retkunsido, mi plibonigos miajn gramatikajn konojn kaj mi eĉ estus devigata danki la kronviruson, ne ĝian mortminacon, sed la strangan situacion tra kiu ni iras, mi ne scias kien, sed mi esperas ke ni baldaŭ vidos la finon de la tunelo kun granda kaj bela lumo, ĉar la mondo meritas novan ŝancon, ĉar mi certas ke la mondo renoviĝos post ĉi terura sperto.

Ángel Arquillos



HISPANA AMIKARO DE FERVOJISTAJ ESPERANTISTOJ


En Andaluzio post la sperto dum la IFEF kongreso okazinta en Malago pasintjare nakiĝis nova grupo HAFE, kiu rilatas al fervoja esperantista mondo, kaj grupo da hispanoj el kelkaj regionoj de la lando entuziasmiĝis pri la ideo. Kvankam tio ne rilatas al la Hispana Federacio, certe temas pri Esperanto kaj mi trovis interesa la ideon aperigi mallongan tekston por propagandi ĝin inter la legantoj de Boletín. La grupo jam disponas pri TTT-paĝo kreita de la sekretario de AEU kaj HAFE, José María Rodríguez: <https://hafe-19.websself.net/> kaj por plia informo vi povas skribi la jenan retadreson: fervojista@esperanto.ac

Mi profitas la okazon por publikigi artikolon verkita de la Sekretario, por ke la legantaro vidos ke la fervoja afero estas tre interesa kaj kultura.

LA SPECIFA LARĜECO DE LA HISPANA FERVOJ-TRAKARO

Tiuj ni, kiuj jam sufiĉe maturiĝas, aŭskultis iufoje en la lernejo, ke trak-larĝo en hispanaj fervojoj estas malsimila al tiu de la cetera Eŭropo por malfaciligi eblajn invadojn el Francio. Kiel tiutempaj infanoj ni alktimiĝis ne diskuti pri tio kion ni lernis, tamen estas eble demandi, ĉu militaj invadoj ofte realiĝas per-trajne? Tute ne! Do, tiu malsimila trak-larĝo en Hispanio, kaj ankaŭ en Portugalio (pro tio ties nomo “ibera trak-larĝo”) devas havi aliajn kaŭzojn. Inter alie, oni devas diri, ke Portugalio havas landlimojn nur kun Hispanio, do, por eviti malfacilaĵojn okaze de internaciaj trajn-vojaĝoj, ili nepre devis adopti la hispanan larĝecon.

Ekzistas specifaj kaŭzoj por uzi en Hispanio trak-larĝecon tute malsimila al tiu de Eŭropo kaj ili tute ne rilatas al militaj kialoj. La hispana geografio, aŭ pli bone dirita la hispana orografio, estas plena je montoj kaj malebenaĵoj, do, oni bezonis potencon lo-



komotivon por treni vagonaron. Tio estas, la kaldrono kiu produktas vaporon por movi la lokomotivon devis esti pli granda kaj larĝa ol tiuj uzataj en la cetera Eŭropo, ĉi tiel, ankaŭ trakoj devis esti pli larĝaj ĉi tie en Hispanio. La mezuro pripensata de la inĝenieroj en la jaro 1844, kiam oni alprenis tiun decidon en Hispanio, estis 1.688 mm-oj, anstataŭ la 1.435 mm-oj uzataj en Eŭropo.

Ĉi tiuj malsimilaj larĝoj de la eŭropa kaj la iberia trakaroj malfaciligis la komercajn kontaktojn inter Hispanio kaj Eŭropo. La afero povus resti solvita en la jaro 1886, tiam okazis en Berno (Svisio) internacia fervojista kongreso, kiu celis unuigi la larĝecojn de ĉiuj eŭropaj trakoj. Kelkaj eŭropaj landoj, kiel Nederlando, kiu ankaŭ konstruis sian trakaron kun specifa larĝeco, modifis ĝin, tamen ne Hispanio, kiu decidis daŭrigi la konstruon de novaj fervoj-linioj laŭ tiu specifa larĝeco.

La afero iomete solviĝis en la jaro 1960, kiam oni konstruis la unuajn larĝo-ŝanĝilojn, temas pri ilaro kiu kapablas modifi aŭtomate la larĝecon de la radaksoj en la vagonaroj. La unua larĝo-ŝanĝilo ekfunkciis en la jaro 1967 en Hendajo, ĉe la landlimo inter Hispanio kaj Francio. Do, estis eble daŭrigi la trajnan vojaĝon inter Madrido kaj Parizo per sama trajno.

Tamen, ĉi tiu larĝeco de 1.688 mm-oj ne estas la ununura uzata en Hispanio. Okaze de la konstruo de grandrapida trajn-linio en Hispanio (nomata *AVE*) dum la 90aj jaroj de la pasinta jarcento, oni adoptis la internacian larĝecon, tio estas 1.435 mm-oj. Trafé oni pripensis tiam, ke tiuj linioj poste daŭriĝus per ligoj al aliaj francaj linioj, do, oni pli-rapidigis la vojaĝon se oni evitis la ŝanĝon de larĝecon en la landlimo. Oni devas diri ankaŭ, ke la tiama hispana registaro eĉ pripensis modifi la larĝecon de la tuta fervoja liniaro en Hispanio, tamen la kosto estus enorma, do, oni preferis konstrui tiujn novajn kun la eŭropa larĝeco kaj ne tuŝi la antikvajn trakojn.

Se vi iufoje vojaĝis de Madrido en Alheciron, en la kadiza provinco, dum la lastaj jaroj, vi sendube haltiĝis dum kelkaj minutoj en Antekero, tio ŝuldiĝas al la fakto, ke de Madrido ĝis Antekero, la trajno veturas sur nova trakaro kun eŭropa larĝeco kaj de Antekero ĝis Alheciro, la trakaro denove uzas iberan larĝecon, do, dum kelke da tempo, feliĉe nur minutoj, la trajno devas modifi la larĝecon de sia radaksaro.



Alia trak-larĝo ekzistanta en Hispanio estas tiu de la trajnoj *FEVE*, *hispana fervojoj sur mallarĝa trakaro*, ĉi tiuj trajnoj veturas sur trakoj kies larĝeco estas ĝuste 1.000 mm-oj, tio estas unu metro. Ĉi tiu larĝeco ankaŭ estas uzata de la vaskaj trajnoj *Euskotren* kaj de *FGC*, fervojoj de la kataluna registaro. Ĝi ankaŭ estas uzata de kelkaj turismaj trajnoj kaj ĉe minejaj zonoj.



La influo de britaj inĝenieroj estas okulfrapa en la konstruo de la unuaj trajnoj en Hispanio, tiel, la linio inter Soller kaj Palmo en la insulo Majorko, tre fama turisma trajno, uzas trakon kies larĝeco estas ĝuste 914 mm-oj, tio tute egalas al unu brita jardo. Laste, kiel anekdoto, oni devas diri, ke la linio 1-a de la madrida metroo estas iomete speciala, ties trak-larĝeco estas 1.445

mm-oj, konata kiel “madrida trak-larĝeco”. Laŭdire ekzistis eraro en la trapaso de la brita mezur-sistemo en la hispanan kaj tiu “mis-traduko” provokis eraron de 10 mm-oj en la konstruo de tiu linio. Verdire tradukoj ne ĉiam estas bonaj, tion ni tre bone scias kiel esperanto-parolantoj.

J.M.R.H.

De la Hispana Amikaro de Fervojistaj Esperantistoj



DOKUMENTOJ ALVENINTAJ AL LA BIBLIOTEKO EN 2019

Dum la jaro 2019 eniris la bibliotekan katalogon sekvaj dokumentoj:

- Donacinto: *Jorge Camacho*
Erotika poezio en Esperanto, 2006
Gregor, Douglas B. *La Esperanta traduko de la Malnova Testamento*, 1958
Hiroataka, Masaaki. *Kiel verki hajkon en Esperanto*, 2012
Akvon, mi petas!, 1984
Nanba, Ŝooĵi, *Bonvenon al Osaka*, 2007
Nanba, Ŝooĵi, *Nara promene*, 2007
Nisimura, Masao. *Edelvejso*, 1956
Ainaj jukaroj, 1989
El Manĵoo, 1971
Ossaka, Kenĵi. *El orienta florbedo*, 1956
Verda parnaso, 1932
Miyamoto, Masao. *Naskitaj sur la ruino*, 1976
Miyamoto, Masao. *Pri arto kaj morto*, 1967
Okada, Haru. *Notoj pri la Delto*, 1992
García Fumero, Alberto. *Nia vortaro por latinamerikanoj*, 2015
Schulhof, Stanislav. *Kion la vivo alportis*, 1911
Hankel, Marie. *Sableroj*, 1911
Tiflisano. *Poemaro*, 1911
El parnaso de popoloj, 1983
Taylor, Kathrine Kressmann. *Nekonata adresito*, 2018
Pióro, Julia. *Bildo de la mondo*, 1992
Pióro, Julia. *Fenestro kristala*, 1981
Domènech, Artur. *Poemoj*, 1937
Pizzi, Francesco. *La protektanto*, 1932
Droogendijk, C. Chr., *Esperantaj poemoj*, 1917
Murgin, Canko. *Kantoj por la paco*, 1957
Schoor, Jan van. *Amo kaj poezio*, 1928
Auld, William. *A raĉa menina*, 1992
Tri hajkaroj, 2007
Mallia, Carmel. *Cent kapricaj raketoj*, 2000
Mallia, Carmel, *Distre-libere*, 2005
Hemingway, Ernest. *La oldulo kaj la maro*, 1996
Donacinto: *Grupo Esperantista Vigués Paco kaj Amo*
Courtinat, León. *Historio de Esperanto. Vol. 1*, 1964
Kristnaskaj kantoj, 1990
Internacia kanzonaro, 1976

Post la inundo, 1988
Bean, Cecil Morris. *Matematika terminaro*, 1954
Militista vortareto, 1955
Butler, Montagu C. *Muzika terminaro*, 1960
Gumá y Clavell, Salvador. *Kiam floras la timianoj!*, 2001
Zahn, Ernst. *La patrino*, 1923
Urbanová, Eli. *Nur tri kolorojn*, 1960
Diego, Fernando de. *Nuevo método de esperanto para clases y autodidactas*, 1982
Seiwert, Lothar J. *La aboco de tempoplanado*, 1995
Vu, Kan. *Kampuĉio*, 1979
Abraham, Georgo. *Respostas a questões gramaticais do Esperanto*, 1993
Junulara kantareto, 1980
Sakurai, Jasuo. *Dek gvidprincipoj de la Oomoto-Movado*, 1960
Bonaj novaĵoj por vi, 1995
Propraj nomoj de sanktuloj kaj sanktulinoj, 1962
Wannemakers, H. G. *Propraj nomoj en la Nova Testamento*, 1963
Baghy, Julio. *Metodiko – demandaro*, 1972
Hori, Ŝoiĉi. *La volvotigo de amikeco*, 1965
Homenagem dos esperantistas, 1974
Francis, John. *Misio sen alveno*, 1982
Arntz, Helmut. *Faktoj pri Germanujo*, 1966
Herodoto. *Historio*, 2006

Donacinto: *Hirosima Esperanto-Centro*
Osioka, Taeko. *Atestas atombombito koredevena Pak Namĵu*, 2018

Donacinto: *Manuel Parra*
Eco, Umberto. *La búsqueda de la lengua perfecta en la cultura europea*, 2015
Vivancos, Eduardo. *Unu lingvo por ĉiuj: Esperanto*, 2019

Donacinto: *Philippe Benoît*
Lorenaj fabeloj, 2018

Donacinto: *Miyazawa Naoto*
Katô, Naoki. *Septembre, surstrate en Tokio*, 2018

Donacinto: *Familio de Valentín Ladrero*
Scott, Herbert M. *Filatela terminaro*, 1928
Vazov, Ivan Minĉev. *Avo Joco rigardas*, 1946

Donacinto: *Marija Belošević*
Nova evangelizado, 2016
Zagreb, 2015 (2 vol.)

Donacinto: *Leandro Trujillo Casañas*
Pri adopto kaj omaĝo, 2019

Donacinto: *Editora Lorenz*
André Luiz. *La senditoj*, 2017

Donacinto: *Federico Gobbo*
Gobbo, Federico. *Interlingvistiko, fako por multlingveco*, 2015
Lingua, politica, cultura, 2016

Donacinto: *Elda Doerfler*
Doerfler, Elda. *Triesto, inter karsto kaj maro*, 2013


Donacinto: *Antonio Valén*
Baghy, Julio. *Hura!*, 1986
Moritz, Joachim. *Lingvoj en Eŭropo : kiuj? kie? kiom?*, 1979
Moritz, Joachim. *Lingvoj en Eŭropo : statistiko kaj iomete pli*, 1988
Ribillard, Jean. *Vagado sub palmoj*, 1977
Nervi, Mauro. *La turoj de l' ĉefurbo*, 1978
Boulton, Marjorie. *Cent ĝojkantoj*, 1957
Kalocsay, Kálmán. *Kiel fariĝi poeto aŭ Parnasa gvidlibro*, 1932
Goethe, Johann Wolfgang von. *Ifigenio en Taŭrido*, 1982
Donacinto: *Miguel Fernández*
O sol é secreto, 2019

Donacinto: *José María Salguero*
Bronštejn, Mikaelo. *Iam, kiam...*, 2005

Donacinto: *Ayuntamiento de Cheste*
Castillo García, José Vicente. *Los trenes de la esperanza*, 2019

Trovu ĉi tiujn kaj aliajn dokumentojn en la retkatalogo de Biblioteko Juan Régulo Pérez: <http://biblioteko.esperanto.es/>

Ana Manero



Aferoj pri kiuj
vi neniam legos
en Enciklopedio


LA NEKREDEBLA HISTORIO DE LA PASTRO FÉLIX

La plej grava riĉeco de nia movado estas la diverseco de homoj kiuj, nun aŭ iam, parolis Esperanton. Ĉirkaŭ ni, estas eble trovi homojn sagacajn kaj naivajn, klerajn kaj mallertajn, sanktajn kaj perfidajn, poetojn kaj negocistojn... ĉiuj estas bonvenaj kaj pri ĉiuj ili ekzistas io rakontinda. Unu el tiuj homoj, kiu dum jaroj agadis en nia movado kaj flue parolis la internacian lingvon, estis ĉefrolulo de rakontinda historio: *la nekredebla historio de la Pastro Félix*.

Félix de Valois ARANA ARENAL naskiĝis en Burgos en la jaro 1923 ĉe tradicia familio. Li estis malproksima parenco de la baska naciisto Sabino Arana kaj en lia abunda frataro troviĝis militisto kiu luktis en la frankisma “Blua Divizio”, pastro kaj monaĥino. Li mem studis en la Seminario de la Klareta Ordeno en Santo Domingo de la Calzada, tie li fariĝis katolika sacerdoto en la jaro 1949. Tuj li iris kiel misiisto en Ekvatoran Gvineon, en tiuj jaroj tiu afrika teritorio estis hispana kolonio kaj ankaŭ la celo de novaj pastroj kiuj deziras disvastigi siajn religiajn kredojn kaj bapti kiel eble plej grandan nombron de indiĝenoj. Félix estis klera homo, li parolis kelkajn lingvojn, ankaŭ Esperanton, kvankam mi ne trovis datumojn pri kiumomente li lernis la zamenhofan lingvon. Li verdire regis tre bone nian internacian idiomon.

Félix Arana, kvankam tiutempe li uzis sian kompletan nomon, tio estas “Félix de Valois Arana”, enmiksiĝis en la kulturan vivon de la kolonio, tiel, post kelkaj jaroj en Gvineo, li fariĝis direktoro de la kultura revuo de la teritorio *La Guinea Española*, krome, li estis ofta preleganto okaze de konferencoj organizataj de la hispana registaro, ekzemple en la jaro 1951 li prelegis pri “Psikologio de la Nigra Popolo”, li ankaŭ lernis la fangan (gvinean) lingvon, kun la celo alproksimiĝi al la kulturo de la teritorio.

En tiu jaro li ankaŭ estis profesoro en la Supera Indiĝena Kolegio kaj en la Katolika Seminario de Banapá, tuj apud la ĉefurbo de la hispana kolonio Fernandopoo. Tie, Felix de Valois Arana ne nur disvastigis la katolikan religion, sed ankaŭ la internacian lingvon. Li organizis Esperanto-kursojn en la Pastra Lernejo de Banapá kaj li eĉ kreis malgrandan grupeton de gvineaj esperantistoj kun 40 lernantoj. Li revis pri la onta fondiĝo de esperantista gvinea asocio.



Cele al la disvastigo de Esperanto en Ekvatora Gvineo, li ricevis oftajn helpojn de la Hispana Esperanto-Federacio kaj eĉ de eksterlandaj samideanoj, kiuj havigis al li libro-metodojn kaj abonojn al E-revuoj. Kontraŭe estis oftaj liaj mon-donacoj, eĉ malgrandaj, al la hispana E-movado. La allogeco de nia ĉefrolulo estis okulfrapa, li estis alta, tre kulturema kaj simpatia, okaze de parolado kun tiama enloĝantino de la hispana kolonio, ŝi konfesis al mi, ke preskaŭ ĉiuj eŭropaj virinoj en la tiama gvinea ĉefurbo sekrete enamiĝis al li, malgraŭ la pastra fraŭleco de nia ĉefrolulo.

Dum tiuj jaroj, malofte Felix de Valois Arana povis reveni en Hispanion, sed kiam li sukcesis fari tion, li sendube partoprenis en Esperanto-kongresoj kaj renkontiĝoj. En la jaro 1954 li ĉeestis la hispanan kongreson de Esperanto, okazigita tiujare en

Zaragozo, tie li partoprenis apud gvinea juna esperanto-studento Manuel ENGUEMA. Inter la aktoj de li okazigitaj dum la Kongreso estis la religia di-servo al la kongresanaro, kiu okazis en Esperanto.

En la jaro 1954 finiĝis la aventura misio de Felix de Valois ARANA en Afriko. Tiam, la Klareta Ordeno revenigis lin en Hispanion, ĝuste en la kantabran vilaĝon Castro Urdiales. Tie li laboris kiel profesoro en lernejo kaj religia predikisto en sia religia ordeno. Dum tiuj jaroj li ankaŭ kunlaboris en la disvastigo de Esperanto, li prelegis okaze de la fondiĝo en la jaro 1954 de la Santandera Esperanto-Grupo. En la jaro 1956 li suferis personan krizon, li mem asertis, ke li ne estis jam “ekzemplo-dona” sacerdoto kapabla helpi la ceterulojn, do, li petis forpermeson al la katolikaj aŭtoritatoj por ĉesian agadon kiel pastron.



Dum pliaj sep jaroj li estis profesoro pri lingvoj en Aranjuez (Madrido) kaj poste li iris en Barcelonon, por estri prestiĝan germanan turism-agentejon, sendube lia lingvo-kono helpis lin profesie. Ne ekzistas dum tiuj jaroj pruvoj pri la ebla Esperanto-agado de Felix Arana, tamen de tempo al tempo li kunlaboris pere de mon-donacoj al Hispana Esperanto-Federacio.

Tutcerte dum tiuj jaroj, 1960-aj, li ne sin dediĉis al religiaj aferoj, li eĉ deklaris, ke li ne vizitis preĝejojn, kvankam li estis homo kun religiaj inklinoj. Okazis en la jaro 1968, ke kvar infanoj asertis, ke la Virgulino Maria aperis antaŭ ili en malgranda vilaĝo de la sevila provinco: El Palmar de Troya. Poste, aliaj enloĝantoj en tiu sama urbeto tion certigis kaj virino eĉ asertis travivi mistikan sperton en tiu loko. Komence de la 7-a jardeko oni diris, ke la tiea akvo estis kapabla plenumi miraklojn, do, multaj pligrimantoj ekiris en El Palmar de Troya, tuj apud la urbo Utrera. Baldaŭ la nomo de la vilaĝeto disvastiĝis unue tra Hispanio kaj poste tra la tuta mondo, la mond-donacoj de piuloj kredantaj je tiuj mirakloj ekvenis en tiun trankvilan terkulturan vilaĝon.


La Roma katolika eklezio sendis tien al vjetnama ĉefepiskopo por pristudi la aferon. Pierre Martin Ngô-Dinh-Thuc ne nur informis pri la afero al la Papo Paŭlo la 6-a, sed li ankaŭ revenis tien kiel fervora pilgrimanto kaj li eĉ ordinis episkopojn, inter ili kelkaj jam katolikaj pastroj kaj aliaj homoj kiuj iris en El Palmar de Troya, altiritaj de la mon-donacoj. Tiuj novaj episkopoj poste ordinis dekojn da novaj pastroj kaj monaĥinoj.

Komence de la jaro 1976, Felix Arana profitis feriajn tagojn por viziti El Palmar de Troya kaj tiel, scii senpere pri tiuj religiaj okazintaĵoj. Dum la vizito io eksterordinara okazis, grupo de ok homoj, inter kiuj troviĝis Felix Arana, ĉestis ekstazon de religia vidanto. Li susure sciigis, ke en tiu grupeto troviĝis pastro, la manoj de la vidanto donis kelkajn religiajn objektojn al Felix Arana, tamen li neniam sciigis tie pri sia eks-pastra kondiĉo. Laŭ Felix Arana poste diris, li travivis tute ne-esprimeblan senton. Poste, alia stranga afero okazis, laŭ alia vidanto, la Virgulino deziris la ĉeeston en tiu loko de la Pastro Felix. Tiam li decidis esti denove pastro preta helpi la ceterulojn kaj pro tio li restis en El Palmar de Troya.

En la monato februaro 1976 oni nomumis al Felix Arana episkopon en El Palmar de Troya tamen li baldaŭ apartigis sin de la plej grava reprezentanto de tiu religia grupo: Clemente Domínguez. Felix Arana sekvis dum sia juneco teologajn studojn, tamen Clemente estis nur oficisto kiu alvenis en El Palmar de Troya altirita de la grandaj mon-donacoj ricevitaj ĉefe de dekstremaj usonanoj. Tiel, en la monato aprilo 1976 Felix Arana deklaris, ke la instruado de Clemente Domínguez estis tute kontraŭa al tiuj de la katolia eklezio, li eĉ verkis libreton sub la titolo *Perfido en El Palmar de Troya*. Multaj eksaj sekvantoj de Clemente Domínguez renkontiĝis tiam ĉirkaŭ la Pastro Felix Arana kaj ili je kelkaj metroj de la impona katedralo de El Palmar de Troya starigis blankan grandan krucon, ekde tiam la movado de la Pastro Felix en El Palmar de Troya estas konata kiel "La Blanka Kruco".

Siafoje, tiu grupo de Clemente Domínguez, kiu unuamamente nur sopiris esti katolika ordeno, rompis rilatojn kun la roma eklezio kiam oni elektis al Clemente kiel novan papon kun la nomo "Gregorio la 17-a". Tio jam estis definitiva paŝo por la retiriĝo de la Pastro Felix Arana de la sekvantoj de El Palmar de Troya, ĉar Arana neniam deziris disiĝi el la roma eklezio. La Blanka Kruco kaj la Pastro Felix deklaris sin anoj de la roma katolika eklezio, la fotografajoj de la romaj papoj prezidis ankaŭ la kunvenejojn de tiu religia grupeto. Verdire Felix Arana estis tre tradicia kaj li uzis la latinan lingvon

okaze de la mesoj de li prezidataj, tamen li neniam deziris krei novan religion kontraŭe al tiuj de la sekvantoj de Clemente Domínguez, kiuj fondis la "Katolikan Palmaran Eklezion".



Ekde tiam Felix Arana instigis komunajn preĝadojn ĉiusabate al kiuj ĉeestis ankaŭ vidantoj kiuj, post ekstazoj, sciigis pri la diaj deziroj por la mondo. La eldiraĵojn de la vidantoj surbendigis Felix Arana kiu poste transskribis ilin por ĝenerala disvastigado. Tamen por li mem li gardis tiujn diajn mesaĝojn senditaj nur por la Pastro Felix Arana kiujn li prinotis atente kaj poste legis en lingvo nur uzata tie de li, en Esperanto. Do, nia kara lingvo neniam restis forgesata de la pastro Felix Arana.

En la jaro 2005 la Pastro Felix Arana forpasis, li ricevis katolikan entombigon kaj funebran ceremonion en Utrera (Sevilo).

J.M.R.H.

SEMO DE MATENRUĜOJ

Ĉi artikolon mi sendis al la E-revuoj Sennaciulo, Beletra Almanako kaj Boletín de HEF (Hispana Esperanto-Federacio). Antaŭparole, mi volas esprimi mian plej profundajn bedaŭron kaj doloron pro la kvanto da vivoj falĉitaj de KOVIM-19, ve!, en la tuta mondo. Kaj mi deziras vortigi mian elradikan indignoplenan krimon kontraŭ la kruela murdo de la usona civitano George Floyd fare de samlandaj policanoj. Kontraŭ ĉiuj, kiuj ie ajn predikas aŭ praktikas rasismon, ksenofobion aŭ diskriminacion pro kialoj etnaj, seksaj, genraj, ideologiaj... Entute, kontraŭ la plej danĝera el la virusoj: faŝismo!

Miguel Fernández

Kiel Prezidanto de la Belartaj Konkursoj de UEA, ĉiujare mi devas verki raporton pri la karakterizaĵoj de la koncerna “rikolto”. Tian raporton, kune kun detala prezento de la priaj BK-rezultoj en ĉiu branĉo kaj subbranĉo, kaj kun la tekstoj de la verkoj tujare premiitaj, Mondial publikigas libroforme sub la titolo *Belarta rikolto*. En mia tiuspeca raporto responda al la jaro 2019, mi esprimis jenajn konsiderojn:

“Grupa literatura agado, en ĉiuj siaj eblaj aspektoj, pasiigas min. Kiel E-verkisto mi konfesas, ke la grupaneco, kiun mi komencis ĝui komence de la 1990aj jaroj kaj iel pluĝuas ĉi-epoke, eksterordinare potencigis mian kreivon. Sen la ekzisto de la grupo, kiun ni epitetis Ibera kaj poste fariĝis konata kiel Ibera Skolo, mi ne produktintus eĉ la duonon de ĉio, kion ĝis nun mi verkis.



Mi instigas beletremulojn al grupiĝo, al kontaktado kun kolegoj diverslandaj, al kolektiva agado, al interŝanĝo de ideoj, projektoj, zorgoj, revoj... Kaj eĉ al apertiĝo al etnaj literaturoj por enkonduki en ilin niajn kreaĵojn kaj por ricevi el ili la vibrojn kaj la formojn, laŭ kiuj oni en ili produktas nuntempajn artaĵojn. Izoliteco ne laŭiĝas al la spirito de Esperanto kaj kondamnus nian literaturon al tio fariĝi anekdota anakronismo”.

Miaflanke, tian apertiĝon (kiun mi nomas elkatakombigo de la E-kulturo) al la hispanlingva literaturo, ĉefe al poezio, mi, kune kun aliaj hispanaj esperantistoj, kultivadas jam de pluraj jaroj. Kutime, ĉi-revue mi ade raportis pri ĝiaj pozitivaj rezultoj. Nun mi resumos la ĉefajn atingojn:

Tian apertiĝon faciligis ĝuste Esperanto mem. Miaj dulingvaj (esperantaj-hispanaj) deklamadoj de poemoj ĉe madridaj najbar-asocioj kontaktigis min kun gravaj poetoj de la skolo nomata “poezio pri la soci-kritika konscio”, kiujn plej interesis la de ili neatendita fakto, ke E-poezio ekzistas. La majorka neesperanta, sed ja esperant-ama, liberecana eldonejo Calumnia Edicions proponis al mi esperantigi poem-antologion de tiuskolaj poetoj. Jen la rezulto: la poemaro *Nova mondo en niaj koroj* (2016), represita en 2019, okaze de la barcelona 92a SAT-Kongreso. Per tiu libro, Calumnia Edicions inaŭguris esperantan sekcion, la kolekton *Revo lucida*. Ne nur. Tiulibre, probable por la unua fojo en la historio de Esperanto, oni prezentis la esperantigon de nacilingva antologio de difinita tipo de nuntempa poezio aldonante al la kompilitaj poemoj originalajn kontribuojn de E-poetoj (Suso Moinhos, Jorge Camacho kaj mi mem) al tiu tipo de poezio.

Tion sekvis, en 2017, publikigo, far la hispana neesperanta eldonejo Lastura, de la tria eldono de fama poemaro de unu el la ĉefaj voĉoj de la antaŭe menciita skolo, María Ángeles Maeso, en dulingva (hispana-esperanta) versio, laŭ deziro de la aŭtorino. Mi havis la honoron okupiĝi pri la esperantigo. La libro, *Vamos, vemos / Ni iras, vidas*, estis dulingve prezentita en prestiĝaj madridaj kulturejoj.

Pluis kunlaboro inter esperantaj kaj hispanlingvaj poetoj. En siaj tri unuaj sinsekvaj numeroj, la ret-gazeto *Caja de Resistencia* [Strikfonduso], unu el la plej gravaj hispanaj diskonigiloj de nuntempa soci-kritika poezio, publikigis ambaŭlingve poemojn de, respektive, la E-poetoj Suso Moinhos, Miguel Fernández kaj Mao Zifu.

Apartan eĥon kaj intereson havis la t.n. migraj opaj deklamadoj organizitaj de la poeto, doktoro pri hispana filologio kaj ĉefa teoriulo de la “poezio pri la kritika konscio” Alberto García-Teresa. Ilin partoprenis ĉirkaŭ 20 hispanaj gepoetoj, inter ili mi mem.

En gaja etoso, ni grupe promenadis en madrida populara kvartalo, akompanate de muziko ludata de buzuk-isto¹, en la jaro 2017, aŭ de violonisto, en 2018. Alveninte al placo, ni haltadis sur ĝi, aranĝis nin en rondo kaj sinsekve voĉlegis proprajn aŭ aliulajn poemojn uzante cirkuligatan megafonon. Miaflanke, antaŭ ol deklami versojn miaplumajn, mi sciigis la kolegojn, ke temas pri mia hispanigo de poemo originale verkita en Esperanto, mia verkolingvo.

Kaj tio vekis admiron kaj grandan simpatian. Post mia hispanlingva deklamo, Antonio Crespo Massieu, unu el la plej aprecataj figuroj de la nuntempa hispana soci-kritika poezio, petis min deklami miajn versojn ankaŭ esperante. Tion mi faris plej volonte. La reago estis kor-karesa. La beleco de nia lingvo entuziasmigis ĉiujn. De tiam, miajn ceterajn deklamojn sur ĉiuj placoj, sur kiuj poste ni haltadis, mi ĉiam faris, laŭpete, ambaŭlingve (hispane-Esperante).

Sekvajare, same okazis tiukadre. Kaj alikadre. Tiel, ke tiumedie mi estas rigardata “la voĉo de Esperanto” en la nuntempa hispana soci-kritika poezio.

Iam, en 2018, García-Teresa kontaktigis min kun la poeto kaj filologo pri la hispana Armando Silles McLaney, kiu i.a. gvidas poezian programeron, “Olvida tu equipaje” [Forgesu vian bagaĝon], en la progresema memmastrumata radio-stacio “Radio Utopía” [Radio Utopio]. Kaj ni forte amiĝis. De tiam mi fariĝis ofta kunlaboranto kiel E-poeto en tiu programero kaj partoprenis diversajn poeziajn aranĝojn iniciatitajn de Silles McLaney jen en la studioj de Radio Utopio, en ĉesto de publiko, jen en la Madrida Ateneo, unu el la plej gravaj madridaj kulturejoj.


El miaj rilatoj kun ĉi grupo, mia poezio ricevis novajn perspektivojn, novajn sugestojn, novajn manierojn aliri nuntempajn temojn, esprimi la inferojn kaj la paradizojn, afliktojn kaj esperojn, batalojn kaj aspirojn de ĉi-jarcentaj homoj. Kelkaj el miaj E-kolegoj tion rimarkis kaj instigis min pluri tiujn novajn vojojn.

Miaflanke, mi reciprokis la bonojn ricevitaĵajn diskonigante, en mia traduko, en E-revuoj kiel, ĉefe, *Beletra Almanako*, *Sennaciulo* kaj *Boletín* de HEF, la poetikojn kaj poemojn de tiuskolaj gravuloj kiel Alberto García-Teresa, María Ángeles Maeso, Antonio Crespo Massieu, Vera Moreno, Jordi Maíz, Armando Silles McLaney... Tiuspeca agado rigardindas plej bonvena kaj konvena por refreŝigo de la E-poezio.

Sed, krom ke miaj dulingvaj partoprenoj kiel poeto en la menciitaj poeziaj aranĝoj fariĝis komunuzaj kaj ŝatataj de miaj hispanlingvaj kolegoj, lastatempe kelkaj el ili ne malofte insistis ĉe mi pri la konveno, ke mi publikigu miajn versojn en la kastilia lingvo. Siaflanke, Calumnia Edicions jam de longe proponis al mi tion efektiviĝi... Fine mi akceptis. Multaj el miaj neesperantaj geamikoj ricevis la novaĵon kun aparta ĝojo. Ĉefe, tiuj, kun kiuj mi loĝis fine de la 1970aj jaroj provante kunvivi laŭ al liberecanaj principoj, pruvante, ke la utopio eblas, kaj preskaŭ tuŝante tiaman revolucion per la pintoj de la fingroj. Unu el ili, Luis Perea, sendis al mi foton de tre bela pentraĵo de li farita por la kovrilo. Alia, la nuntempe aprecata fotisto Tofiño, havigis al mi foton de mi mem por la internaj paĝoj. Cetere, du el la novaj grandaj amikoj, du el la jam menciitaj hispanlingvaj poetoj, alportis sian kompetentecon kaj multe da amo al la projekto: Armando Silles McLaney kiel aŭtoro de amikec-vibra antaŭparolo kaj Jordi Maíz kiel brava kompostisto.

¹ *buzuko*: kord-instrumento, ia longkola liuto, tre disvastiĝinta en Grekio.

Tiele naskiĝis mia unua hispanlingva poemlibro, *Semilla de arrebol*, titolo esperantigebla kiel *Semo de matenuĝoj*. Temas pri antologio, en mia hispanigo, de ĉiuj miaj ĝis nun publikigitaj poemaroj en mia verkolingvo, Esperanto, plus de kelkaj lastatempe verkitaj kaj estonte publikigotaj E-poemoj. Ĉe mi, matenuĝoj ĉiam kreis senton de alianco de la naturo al la homo. De ronda pleneco. De ĉiesa libero. De ĉiuflanka belo. De spirit-karesa promeso. De firma espero pri justa soci-ordo...




Ĉio estis preparita por ke *Semilla de arrebol* vidu la lumon fine de aprilo 2019. Ne nur. Estis antaŭvidita bunta serio da prezentoj de la poem-antologio. En Madrido, kadre de la t.n. Noche de los libros [Nokto de la libroj], kultura evento ĉiujare organizata de la Registaro de la Madrida Regiono por soleni la t.n. Internacian Tagon de la Libro, la 23an de aprilo. Simile, kadre de la populara Madrida Librofiro, la budo de la liberecana FAL (Fondaĵo Anselmo Lorenzo) estis rigardita plej taŭga loko por subskribado de ekzempleroj de la poemaro. Krome, en du el la plej gravaj el la madridaj progresemaĵoj librovendejoj estis antaŭviditaj prezentoj de ĝi. Same, en Radio Utopio, en najbar-asocioj, en prestiĝaj poeziaj spacoj kaj aranĝoj, kiel Poesía en el Bulevar [Poezio en la Bulvarado], gvidata de la poeto Antonio Crespo Massieu. Kaj eĉ sur publika placo en populara kvartalo de Madrido, amata placo, sur kiu jam plurfoje mi metis miajn versojn je la servo de justaj depostuloj de ĝia najbararo...

Ne nur en, sed ankaŭ ekster, Madrido estis antaŭviditaj prezentoj de mia unua hispanlingva poemaro. En Comillas (Cantabria), kadre de la 79a HEF-Kongreso; en Murcia, en Eŭskio... Kaj, ĉefe, en Granado, mia naskiĝurbo. Ho, mia amata Granado! Tie la 4an de junio 2020, devus okazi la kulmino. Ne pli kaj ne malpli ol en la t.n. “Salón de Grados”, t.e. la solenejo, de la Priscienca Fakultato de la Granada Universitato, kie en 1967-68 mi studis la unuan lernojaron de Inĝenierio pri Telekomunikado, antaŭ ol translokiĝi Madriden por ĉi tie pluigi tiajn studojn en la ĉi-urba Politeknika Universitato. Reveni en mian Granadon, en mian tian Prisciencon Fakultaton, 52 jarojn poste, por prezenti ne sciencaĵon aŭ teknikaĵon, sed mian hispanigon de antologio de miaj E-poemoj! Nekredeble! Neniam eĉ minimume konjekteble! Surprizo pleja! Vera donaco fare de la vivo en mia 70-jariĝo!

Sed ankoraŭfoje Esperanto mem ebligis tian mirindaĵon. Nu, Esperanto kaj nia procezo de “elkatakombigo de la E-kulturo”. Siatempe, ĉi-revue kaj diversmedie ni hispanaj esperantistoj informis pri aranĝo jam plurajn jarojn farata en Madrido por montri la centron de la urbo al alilandaj E-vizitantoj, ĉefe kadre de madridaj Esperantaj kongresoj aŭ renkontiĝoj. Temas pri “literatura promonado”, kiun ni nomas “Bohemia nokto”. Sekvante la itineron iratan de la protagonistoj de la teatraĵo *Bohemiaj lumoj*, Ramón del Valle-Inclán (1866-1936), kiun mi esperantigis en 2015, mi klarigas al la promenantaro la artajn-historiajn karakterizojn de la vizitataj lokoj, stratoj kaj monumentoj, en rilato al la senkompara intrigo de tiu majstraĵo de tiu genia galega verkisto. La promonado finiĝas en urbocentra trinkejo, kun esperantlingvaj kantoj, poemdeklamoj kaj prezentaĵo de la sesa sceno de *Bohemiaj lumoj*.

Danke, ĉefe, al la priaj videaĵoj alŝutitaj al Jutubo, ĉi aranĝo akiris ioman famon. Tiel, ke ni estis petataj organizi ĝin dulingve (Esperante-hispane). Unu fojon ni sukcese faris tion. Ni kalkukis je escepta profesiulo pri interpretado, Jorge Camacho, kiu plej flue kaj fidele hispanigis miajn E-parolojn. Kaj ni daŭre petatas ripeti tiun sperton.



Miguel Fernández

Nu, en la printempo de 2019 grupo da profesoroj de la Granada Universitato vizitis Madridon. Antaŭe, spektinte en Jutubo unu el la priaj alŝutitaj videaĵoj, kelkaj el ili sukcesis kontakti mian fratinton loĝantan en Granado kaj, pere de ŝi, min mem. Ili petis min aranĝi por ili “Bohemian nokton”. Kaj mi plej volonte tion faris. La rezulto tiel plaĉis al ili, ke ili elfervoris al mi inviton por prelegi en la Granada Universitato pri io rilata al Esperanto-literaturo.

En septembro 2019, la Seminario Galileo Galilei de la Granada Universitato, kune kun la organizaĵo “Granada Laica” [Granado laika] iniciatis ciklon de prelegoj pri la temo “Ética y laicismo” [Etiko kaj laikeco] en la solenejo de la Priscienca Fakultato de la Granada Universitato. Kaj oni invitis min fermi la ciklon per prelego la 4an de junio 2020. Kiel enorma honoro! Mi elektis jenan titolon por mia prelego: *Lenguaje y poesía como compromiso ético y laico (Presentación del poemario “Semilla de arbol”)*, per kiu mi

volis pravigi mian elekton de Esperanto kiel verkolingvo kaj kiel idealo surbaze de etika-laika engaĝiĝo, krom estetika raviĝo, kaj prezenti mian hispanlingvan poemaron.

Ĉio ĉi ja konstituis universitatan agnoskon de la valoro de la Esperanta literaturo, de la Esperanta kulturo, de Esperanto!

Sed, ve, ve, ve, aperis KOVIM-19, tutmonde alportante morton kaj doloron! En Madrido, hospitaloj saturiĝis de troo da malsanuloj, ĉerkoj amasiĝis en la t.n. Glaci-palaco, ĝis la momento, kiam funebraj entreprenoj, blokita de troo da laboro, povos okupiĝi pri ili... Morto kaj doloro! Homoj mortis sen karesoj kaj vortoj, sen la spiritvarmiga ĉeesto, de la amataj estaĵoj... La 14an de aprilo la hispana registaro proklamis la t.n. alarmo-staton por alfronti la disvastiĝon de la kronviruso. Nun, komence de junio, ĝi pluas, kvankam la dekretita trudizoliĝo mildiĝadas laŭ la mezuro kiel la pandemio estas grade submetita.

Kaj ve, ve, ve, ĉiuj aranĝoj antaŭviditaj por prezentado de *Semilla de arbol* ricevis prokraston, ĝis oni ne scias ĝuste kiam!...

Malgraŭ ĉio, la libro fine vidis la lumon ne en marto sed en majo, dank' al granda persisto kaj multe da amo, aplikitaj de la eldonista skipo al ĝia aperigo, spite la kronviruson kaj ties sekvojn. Kiam multaj eldonejoj disfalis, Calumnia Edicions perbatialis la aperon de *Semilla de arbol*. Neniam mi forgesos tian mirindan obstinon, kiu donis al miaj hispanlingvaj versoj la eblon naskiĝi libroforme. Laŭ la poeto Alberto García-Teresa, ĉiuj ĉi aparte malfacilaj cirkonstancoj multobligas la unikecon de tiu poemaro, ĝian valoron kaj ĝian allog-povon.

Kiam librovendejoj plejmulte “kvarantenis” en Hispanio, Calumnia Edicions malfermis la vendon de *Semilla de arbol* per sia retejo, je aparte rabatita prezo pro la cirkonstancoj, ĝis la momento, kiam eblos akiri la poemaron en butikoj².

Mi plej elkore dankas ĉiujn kamaradojn, amikojn, esperantistojn kaj ne esperantistojn, nekonatajn legemulojn, ĉiamulojn ĉe Calumnia Edicions... kiuj en konsiderinda multo po mendis ekzemplerojn de la libro, premiante tiel la admirindan eldonistan penadon kaj mian modestan poetan laboron. Kaj mi invitas vin ĉiujn agi same.

Apartan dankon mi esprimas al la redakcio de *La Ondo de Esperanto*, kiu, krom ke en ties n-ro 303a ĝi aperigis mian E-version de la lasta poemo en *Semilla de arbol*, aliĝis al kor-karesa omaĝo, kadre de mia 70-jariĝo, iniciatita de la HEF-Prezidanto, José Antonio del Barrio (kiel reciproki al vi, Toño, la tutan dolĉan bonon ricevitajn?), sur paĝo de la novaĵretejo tiu-revua. Kiel belege povas efiki kelkaj aferoj! Kiel mirinda surprizo ricevi bondezirojn el dekoj da diverslandaj esperantistoj sen suspekti, kiel ili sciiĝis pri mia datreveno! Jen do la fonto kaj la mirindaj “kulpuloj” pri tiom da feliĉo.

Geamikoj, ni rezistu plue al KOVIM-19 kaj al la terura pandemio de faŝismo! La unuan ja iam finvenkos la scienco; la duan finvenku nia kuna batalado por la lumo. Ni kunvoju al la lumo. Kaj ni esperu. Ni estas antaŭ istoj de espero.

Sanon kaj poezion!

Sanon kaj utopion!

¹ Ĝi plue rete akireblas ĉe: <http://calumnia-edicions.net/product/semilla-de-arbol-miguel-fernandez>

² *La Ondo de Esperanto*, <https://sezonoj.ru/2020/05/fernandez>



MONDAFEST'2020
LA MONDA FESTIVALO DE ESPERANTO
20 JUNIO - 20 SEPTEMBRO